WIKIPEDIA

Guosa

Guosa estas zona planlingvo proponita de Alexander Ekhoguosa Igbinéwéká en 1965 por esti nacia lingvo de Niĝerio. La lingvo estas bazita sur Haŭsa lingvo kaj aliaj lingvoj de nordo de Niĝerio, la vortprovizo prenas vortoj el lingvoj el sudo de Niĝerio.

En la Guosa, objektoj videblaj kaj konkretaj estas el Hausa kaj aliaj lingvoj de l' nordo de Niĝerio, ekzemple:

Kwàndó = korbo
Kázá = kokino
Ból = balono
Líttáfí = libro
Fénsà = skribilo

Vortoj por nevideblaj aŭ abstraktaj aferoj venas el Igbo, Jorubo aŭ aliaj lingvoj de l' sudo. Estis elektita ĉiam tiu lingvo, kies vorto venas venas unue en alfabeta ordo. Ekzemple la vortoj *bìa* (en Igbo) kaj *wá* (en Jorubo) havas la saman signifon, do Guosa prenu la vorto el Igbo.

Enhavo

Gramatiko
Alfabeto kaj prononco
Ekzempletoj
Bibliografio
Eksteraj ligiloj

Gramatiko

Alfabeto kaj prononco

Á B D É È F G Í H J K L M N Ó Ò P R S T Ú V W Y Z

Guosa uzas la latinan alfabeton kun diakritikoj por indiki tonon: ´ indikas alta tono, ` indikas malalta tono, ^ indikas malkreska tono, meza tono ne estas markata.

Estas la *Ilowe Naijeriya*, niĝeriaj apartaj sonoj: c (ĉ) kiel en "àbíncí": [manĝo]; gb kiel en "gbóntì": [aŭdi]; ng kiel en "mo ng shìengá": [mi estas iranta]; kp kiel en "íkpèrè:" [adjektivo].

Ekzempletoj

- ò chètó ájì ‘wá tí shìengá gídá (nia klasmonitoro iris hejmen).
- ó tí shìhé kófà? (ĉu vi malfermis la pordon?)

- báasì, mó tí shìhé kófà (jes mi malfermis la pordon).
- bíko, fún mi ní rúwá (bonvole, donu al mi akvon).

Bibliografio

- Alexander Igbinéwéká (1987): The dictionary of Guosa language

vocabularies. Lagos: Guosa Publications, 52 p.

- Alex Igbiniweka: Teach Yourself Guosa Language Book 2: Nigeria’s future common indigenous lingua franca. Richmond, CA: Guosa Publication Services, 1999.

Eksteraj ligiloj

http://www.edofolks.com/html/pub37.htm

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Guosa&oldid=4654785"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 13:23, 20 okt. 2012.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.